

# TAKE

Reg. des Associations TGI Colmar VOL. XXXX IX n°38

## Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj.

Association mondiale des ESPERANTOPHONES professionnels du bâtiment

90, rue du Tiefenbach FR- 68920 Wintzenheim-FRANCE

Tel. **+33 (0) 3. 89 80 32 27** Fakso: **+33 (0) 3. 89. 79. 40. 73**


Poŝta banko: CCP 2 549 46 A Strasbourg

IBAN: FR58 2004 1010 1502 5494 6A03 650

BIC: PSSTFRPPSTR

UEA konto: ekat-i Rotterdam NL

Retejo: <http://take.esperanto.free.fr>



SEKRETARIEJO: TAKE-ESPERANTO Ret-poŝto: [verdapiĝo@gmail.com](mailto:verdapiĝo@gmail.com)

ĉe Pierre Grollemund 51 rue Paul Vaillant-Couturier FR -42000 SAINT ETIENNE Tel: +33 (0) 6 20 46 45 2

## Raporto por la jara Ĝenerala Membro-Kunveno de TAKE

Dimanĉon, la 6an de novembro 2022

### AGAD-RAPORTO por la jaro 2022

- Ŝajne neniu el niaj membroj partoprenis la Universalan kongreson, en Montrealo. Tial ni ne povis informi pri TAKE. La kongreso 2022 de SAT (Sennacieca asocio Tutmonda) antaŭvidita en Moskvo, estis evidente nuligita.
- Tamen, kelkaj el niaj membroj partoprenis en aliaj kongresoj: ekz. ĉe SAT-Amikaro (Francia filio de SAT) 1 membro, Inter-asocia Kongreso en Trélissac / Itala kongreso 2 personoj.
- Dum la jaro, ni strebadis starigi novajn kontaktojn: rusa inĝeniero, al kiu ni ne plu povas sendi nian broŝuron, sed nia kasisto volonte sendos la pdf version, kiam li ekscios pri la taŭga ret-adreso. Pliaj kontaktoj estis kun Brazilo.
- Ni provis ekstarigi KK (konstru-kolektivon) pri la temo "skafalfoj", kies normoj estas ofte internaciaj (almenaŭ en Eŭropo). Ĝis nun partoprenis en tiu malfacila kunlaborado nur homoj de eŭropaj landoj. Skafaloj ekzistas ĉie en la mondo (ni pensas precipe pri la skafalfoj el bambuo en aziaj landj) sed ĝis nun, ni ne sukcesis arigi tiu-cele novajn kontribuantojn. Evidente, la laboro daŭros.
- Ĉiam strebado al aŭtoroj: nia revuo KONSTRUADO-kajero pli kaj pli respegulas temojn de urbanismo kaj arkitekturo. Tio trafe kompletigas la teknikajn temojn.
- La revuo KONSTRUADO-kajero 2022 bone aperis en printempo. Ni sukcesis eldoni revuon kun 80 paĝoj. Ĉiuj paĝoj kun fotoj estas koloraj. Kun 14 artikoloj, verkitaj de nur 4 malsamaj aŭtoroj. Ĉi-jare, la ĉefaj temoj estis: izolado kaj skafalfoj.
- La nombro da membroj estas malpli ol 50. Krome ni sendas al deko da asocioj ekzempleron de Konstruado Kajero kaj al aŭtoroj 2 ekzemplerojn. La ceterajn ekzemplerojn ni provas vendi okaze de forumoj, kongresoj, renkontiĝoj.
- Ni klopodis konatigi nian eldonaĵon, tial ni ankaŭ aperigis informojn kaj reklamojn en la revuoj "La Informilo" kaj "SAT-amikaro", kun la celo trovi novajn membrojn.
- S-ro Ł Ź proponis zorgi pri la retejo de TAKE por ĝin plibonigi. Tamen ĝis nun li ankoraŭ ne sukcesis interveni aŭ ion proponi.